

Tero de la Homoj, Antoine de Saint-Exupéry, II.
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1986.10.04

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-180/Radiokasedo-180-21-86-A-1121-Claude-kaj-Andree-GACOND-Tero-de-Homoj-Antoine-de-Saint-Exupery-2.mp3>

Cl.- Parolas Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

A.- La pasintan sabaton ni atentigis vin pri la libro "Tero de la Homoj" de Antoine de Saint-Exupéry, kiu estas nun legebla en esperanto dankal bonega elfrancigo de Henri Vatré. Eldonis tiun romanon Artur E. Iltis.

Cl.- Ni legis al vi la priskribon, kiun Saint-Exupéry faras pri la falo de lia aviadilo en la dezerton de Egiptio. Estis en la jaro 1936. Hodiaŭ ni vagadu kun li en la dezerto:

A.- (p. 108) "Mi do ekiras, kaj eĉ ne scias, ĉu mi sufiĉe fortos por reveni...

Cl.- Dank'al la aŭroro, la dekorado ŝajnas al mi mem funebra. Kaj mi unue marŝas kun la manoj en la poŝoj, kvazaŭ marodisto. Hieraŭ vespere, ni metis kaptilojn ĉe la aperturo de kelkaj misteraj ter-nestoj kaj en mi vekigas ŝtel-ĉasisto. Mi iras unue kontroli la kaptilojn: ili vakas.

A.- Mi do ne trinkos sangon. Verdire mi tion ne esperis. Se mi apenaŭ elreviĝas, mi estas, male, tre scivola. El kio vivas tiaj bestoj en la dezerto? Ili estas sendube "fenekoj" aŭ sablovulpoj, etaj karno-voruloj kun grandegaj oreloj kaj la amplekso de kunikloj. Mi ne rezistas mian emon kaj sekvas la spurojn de unu el ili. La spuroj min kondukas al streta sablo-rivero, kie ĉiuj paŝoj klare enpremiĝas. Mi admiras la gracian palmon, kiun tri fingroj ventumile formas. Mi imagas mian amikon leĝere trotanta je tagiĝo, lekanta roson de sur la ŝtonoj. Ĉi tie la spuroj plidistiĝas: mia feneko kuris. Tie kunulo venis por akompani kaj ili trotis kune. Mi tiel ĉeestas kun stranga ĝojo matenan promenon. Mi ŝatas ĉi signojn de la vivo. Kaj mi iom forgesas mian soifon...

A.- Fine, mi alpaŝas la manĝo-ŝrankojn de miaj vulpoj. Je ĉiu centa metro emerĝas ter-nivele seka arbusto liliputa, ampleksa kiel supujo, kaj kies tigoj plenas de oritaj heliketoj. Je tagiĝo, la feneko iras provianta. Kaj ĉi tie mi renkontas grandan naturan misteron.

Cl.- Mia feneko ne haltas antaŭ ĉiuj arbustoj. Iujn, plenajn de helikoj, ĝi disdegne ignoras. Kelkajn ĝi observas kun videbla singardo. Aliajn ĝi priplukas, sed sen ilin komplete prirabi. Li deprenas du aŭ tri konkojn kaj vizitas alian restoracion.

A.- Ĉu ĝi ludas ne kontentigi en unu fojo sian hungron, por ricevi pli daŭran plezuron el sia matena promeno? Mi tion ne kredas. Ĝia ludo tro bone koincidas kun necesa taktiko. Se la feneko sin satigus jam ĉe la unua arbusto, ĝi tiun tute senigus, en du aŭ tri manĝoj, de ties vivanta ŝarĝo. Kaj tiel, de arbusto al arbusto, ĝi neniigus sian bredadon. Sed la feneko ja bone sin gardas ĝeni la prisemadon. Ne nur ĝi sin turnas, por unu sola manĝo, al cento da tiaj brunaj tufoj, sed ĝi neniam elprenas du najbarajn konkojn sur la sama branĉo. Ĉio okazas kvazaŭ ĝi konscius pri la risko. Se ĝi sin satigus sen antaŭzorgo, ne plu estus helikoj. Kaj se ne estus helikoj, ankaŭ fenekoj ne estus.

Cl.- La spuroj min rekondukas al la ter-nesto. La feneko estas tie, min sendube aŭdanta, kaj timigita de la bruoj de mia paŝo. Kaj mi diras al ĝi: “Vulpeto mia, mi kaputas, sed estas strange, tio ne malhelpis min interesiĝi pri via humoro...”

A.- Kaj mi restas ĉi tie revante, kaj ŝajnas al mi, ke oni adaptiĝas al ĉio. La ideo, ke li mortos eble post tridek jaroj ne difektas la ĝojon de homo. Tridek jaroj, tri tagoj... estas afero de perspektivo.

Cl.- Sed necesas forgesi iujn bildojn.

A.- Nun mi daŭrigas mian iradon kaj jam, kun la laciĝo, io en mi transformiĝas. Se miraĝoj ne ekzistas, mi ilin inventas...

Cl.- Oho!

A.- Mi levis la brakojn kriante, sed la gestanta viro estis nur nigra roko. Ĉio jam animiĝas en la dezerto. Mi deziris ĉi dormantan beduenon kaj li ŝanĝiĝis en nigran arbo-trunkon. Arbo-trunko? Tia ĉeesto min surprizas kaj mi min klinas. Mi deziras levi rompitan branĉon: ĝi estas el marmoro! Mi restariĝas kaj rigardas ĉirkaŭ mi: mi ekvidas aliajn nigrajn marmorojn. Antaŭdiluva silvo kovras la grundon per siaj rompitaĵoj. Ĝi disfalis kiel katedralo, antaŭ centmil jaroj, sub geneza uragano. Kaj la jarcentoj rulis ĝis mi ĉi ŝtumpojn de gigantaj kolonoj, poluritajn kvazaŭ ŝtalaj pecoj, ŝtoniĝintajn, vitriĝintajn, inko-kolorajn. Mi ankoraŭ distingas la tuberojn de la branĉoj, mi rimarkas la tordiĝojn de la vivo, mi nombras la ringojn de trunko. Ĉi silvo, iam plena de birdoj kaj muziko, estis frapita de malbeno, kaj ĝi ŝanĝiĝis al salo. Kaj mi sentas, ke ĉi pejzaĝo min malamikas. Pli nigraj ol la fera kiraso de la montetoj, ĉi solenaj defalaĵoj min rifuzas. Kion mi faru, ĉi tie, mi, vivanta, meze de ĉi nekorupteblaj marmoroj? Mi, pereema, mi, kies korpo dissolviĝos, kion mi faru ĉi tie en la eterneco?

Cl.- Ekde hieraŭ mi jam marŝis preskaŭ okdek kilometrojn. Certe al la soifo mi ŝuldas ĉi vertiĝon. Aŭ al la suno. Ĝi brilas sur la trunkoj ŝajne oleaj glaciaj. Ĝi brilas sur ĉi universala karapaco. Ĉi tie nek sablo, nek vulpoj plu ekzistas. Restas nur grandega amboso. Kaj mi marŝas sur ĉi amboso. Kaj mi sentas en mia kapo la sunon sonoregi. Ha! tie for...

A.- Oho! Oho!

Cl.- Nenio estas tie for, ne ekscitiĝu, estas la deliro.

A.- Mi parolas al mi mem, ĉar mi bezonas voki mian racion. Tiel malfacilas rifuzi kion mi vidas. Ne facilas ne kuri al tiu marŝanta karavano... tie... vidu!...

Cl.- Stultulo, vi ja scias, ke vi mem ĝin inventas...

A.- Tiam nenio veras en la mondo...

Cl.- Duafoje ni legis al vieron el la romano "Tero de la Homoj" de Antoine de Saint-Exupéry, kiun vi povas ekde nun frandi en esperanto dankal tre bona elfrancigo de Henri Vatré kaj al la

eldona agado de Artur E. Iltis. La venontan sabaton ni trian kaj lastan fojon revenigos vin al tiu posedinda kaj leginda romano.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi: Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*